

# ESPERANTO


INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 539

OKTOBRO 1950

## HISTORIA EVENTO

TRANSDONO DE LA PETSKRIBO AL UNUIGITAJ  
NACIOJ EN LAKE SUCCESS



[Foto: Brown Brothers, New York]

De maldekstre dekstren: S-ro Afonso Correa, brazila oficisto de la Organizo de Amerikaj Ŝtatoj; S-ro James D. Sayers, konata aŭtoro kaj Komitatano de U.E.A.; D-ro W. Solzbacher, prezidanto de E.A.N.A.; S-ro Floreal Conchado, FD. de U.E.A.; S-ro Benjamin A. Cohen, el Ĉilio, Helpa Ĝenerala Sekretario de UNO ricevas la albumon enhavantan la petskribojn; S-ro Mark Starr, estro de la Usona Deleĝitaro al UNESKO-konferenco pri Eduko de Plenaĝuloj (Danlando 1949); Prof. J. B. Mello e Souza, prezidanto de la Brazila Skolta Asocio kaj iama Ĝen. Sekr. de Brazila Esperanto-Ligo; Prof. H. Sloan, de la Universitato New York, prezidanto de la Konsila Komitato de E.A.N.A.

# ANONCETOJ

*Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu duo da vortoj.*

**Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.**

**Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.**

**Korespondi kaj interŝanĝi** poŝtmarkojn, "Cartes-Maximum" deziras Richard Khel, Pivonkova 2124, Ĉeĥoslovakujo.

**La Kvakera Mesaĝo** pri la Krista lumo interna en la koroj de ĉiuj homoj ĉie ajn. Du libretoj haveblaj kontraŭ unu respondkuponon. G. B. Tordoff, 82 Pendennis Park, Bristol 4, Anglujo. (Kvakera Esperantista Societo).

**Rubén Leonard Guidotti**, Caseros No. 123, Caseros (provincia Buenos Aires) Argentino, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn laŭ Yvert katalogo aŭ kvante laŭ valoro, kaj poŝtkartojn.

**Prof. Pedro Calvo**, Plaza Mayor 11, Palencia, Hispanujo, 26-jara, deziras ricevi fotografajojn de fraŭlinoj el tutmondo. Nepre sendos aliajn rapide.

**Miguel Sandino**, Lope de Vega 14, Palencia (Castilla), Hispanujo, deziras korespondi kaj interŝanĝi pm. tutmonde.

**Pro malsano J. Ernesto Guillem** (en Valencia, Hispanujo) ne povas nun respondi al siaj karaj geamikoj; post resaniĝo ĉiuj ricevos respondon.

**Kuracisto sesdekjara** deziras diskuton kun gesamideanoj pri ebleco fariĝi centjaraga. D-ro Wegener, Hollestr. 1, (22a) Essen, Germanujo.

**Nekatolikoj**, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Sekr. Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

**Luanda, Angola, Okcidenta Portugala Afriko**, Alfredo Figueiras, Caixa Postal 1260, deziras korespondi pri diversaj aferoj kun tutmondaj gesamideanoj.

**Vintru en sudo.** Du ĉambroj, kuirejo, meblitaj, 5,000 frankoj monate. Detaloj: Yelland, Aspremont (A.M.), Nice, Francujo.

**Pernambuka Esperanto-Asocio** serĉas kian ajn materialon pri Esperanto por estonta 2-a ekspozicio esperantista je la 15a de Decembro ĉijare. Bonvolu sendi al Pernambuka Esperanto-Asocio, Rua Conde de Bôa Vista 1277, Casa D'Italia, RECIFE, Est. Pernambuco, Brazilo.

**Sheffield Esperanto-Societo** okazigas letervesperon 3-an de Novembro. Bonvolu skribi al la sekretario, 43, Sydney Road, Sheffield 6, Anglujo. Respondo garantiata.

**Mi deziras korespondi** kun junaj samideanoj el tuta mondo. Mi respondos en Esperanto, franca aŭ germana lingvoj. Adreso: Josef Košutek, Moravská Nová Ves 530, okres Breclav, Ĉeĥoslovakujo.

## POR LA 36a KONGRESO

tre utila libreto estas

### ESPERANTO IN DER TASCHÉ

WILHELM kaj HANS WINGEN

Ĝi enhavas mallongan gramatikon de Esperanto por Germanoj kaj *bonegan frazaron* por ĉiu, kiu intencas ĉeesti la kongreson

Prezo 3 ŝilingoj

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

# SOMERA UNIVERSITATO

(Malmö 1948)

## ENHAVO

Enkonduko	-	-	-	-	-	Rektoro Karl Söderberg, Svedujo
La laponoj kiel kultura popolo	-	-	-	-	-	Profesoro B. Collinder
La kimraj artofestoj	-	-	-	-	-	R. Rossetti
El la mirinda naturo	-	-	-	-	-	C. Stöp-Bowitz
Astronomiaj sensacioj	-	-	-	-	-	Profesoro K. Lundmark
Ĉefprincipoj de la nuntempa internacia juro	-	-	-	-	-	Profesoro D-ro Ivo Lapenna
El la fronto kontraŭ la malamikoj de la kulturplantoj	-	-	-	-	-	D-ro P. Neergaard
La kalevala kulturo	-	-	-	-	-	Vilho Setälä
Pri la sveda kooperativa movado	-	-	-	-	-	Rektoro S. A. Stahre
Du svedaj humoristoj kaj unu hungaro	-	-	-	-	-	D-ro F. Szilagyí

La libro enhavas la tekstojn de la prelegoj en Malmö

Prezo 4 ŝil. Afranko 2p.  
(17 respondkuponoj)

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

# ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

43a JARO Oktobro 1950

N-ro 539 (10)

Oficiala organo de  
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro :  
HANS JAKOB

Helpredaktoro :  
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al  
ESPERANTO  
Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj  
estas permesataj, kondiĉe ke oni  
citu la fonton. Por bibliografia  
celo oni sendu periodaĵojn en kiu  
aperas represo el ESPERANTO,  
al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA  
kaj de la revuo ESPERANTO,  
abonado, reklamoj, anoncetoj  
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Heronsgate, Rickmansworth  
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj  
(kun membreco kaj jarlibro  
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en  
multaj landoj

#### Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 5 ŝil. : ½ paĝo 50 ŝil.  
½ paĝo 25 ŝil. : ¼ paĝo 12.5 ŝil.

#### Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ  
1 int. respondkuponon por ĉiu  
duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj

## LA 36-a KONGRESO DE ESPERANTO

München 1951

Ĉio fluas ! Je tiu ĉi eldiro ni memoras la varman aplaŭdon kiun ricevis la invito farita de la ŝtata kaj urba registaroj, okazigi la 36-an U.K. en la urbo München. En jaro 1945 neniu estus pensinta je tia ebleco, ke post tiom mallonga tempo ni ree kunvenos en germana urbo. Ja ne necesas komentario pri tio, ĉiu havas sian opinion kiu kredeble diferencas de tiu en 1945.

Por ni Esperantistoj la demando pri kongresloko fariĝas vera problemo. Ne necesas ĉi tie nun prilumi la demandon. Ĉion ekzameninte kaj ĉion pesinte, la Estraro, kiel ankaŭ la Komitato de U.E.A., decidis akcepti la inviton kaj la 35-a U.K. aprobis sen kontraŭstaro. Formale la afero estas en ordo. Kredeble tio ne sufiĉas por konvinki kritikantojn, kiuj ne povas forgesi kio okazis inter 1933 kaj 1945. Nu ni jam larĝe diskutis tion en la kolonoj de *Esperanto* kaj multaj aproboj pravigis la konkludojn de la organoj de nia Asocio.

Ni skribis en Februaro 1948 pri la germana problemo, interalie :  
*"Kion ni ja antaŭdiras ĉi tie estas : Iam la nova Germanujo ekestiĝanta el la ruinoj, sango kaj larmoj, denove ludos gravan rolon, alian ol tiu, kiun ni devis sperti. Tiam nia ideo trovos grundon pli favoran ol iam. Por kunhelpi al tio, ni, ideaj kosmopolitanoj, kunhelpu per klara percepto kaj firma decido."*

Nu tiu ĉi opinio pravigis tre rapide. Ni ne rigardu la politikan situacion, ofte dependan de momenta oportuno kaj politika taktiko. Ne, ni rigardu nian movadon kaj ni konstata, ke ree ekzistas *movado* por Esperanto en Germanujo (okcidenta), ke multaj faktoroj favoraj pledas por München kaj Germanujo. Se iuj principemuloj kredas resti kontraŭ, ni nur memorigu tion, ke ni ja sekvas inviton de homoj, kiuj same suferis sub situacio pasinta kaj ke la frakasa plimulto de niaj samideanoj germanaj restis fidelaj al nia baza ideo, la tuthoma frateco.

Kion ni hodiaŭ deziru estas, ke nenio intervenu, kio malebligos kongresi. Ni deziras al niaj bravaj kunlaborantoj en la estonta kongresurbo la necesajn kuraĝon kaj persiston en la tasko, kiun ili akceptis.

Tial ke ni jam parolas pri **München**, nomo ne facile transskribebla en nia lingvo, ni prefere skribu la nomon laŭ la germana formo. Alilandanoj jam scias pri kio temas ; la provo akordigi prononcon kun la ortografio estas nerekomendinda por uzado.

H.J.

# LA PETSKRIBO

## OFICIALA TRANSDONO AL UNO

Komuniko de D-ro William Solzbacher

Mi havas la honoron informi vin, ke la transdono de la U.E.A.-Petskribo al la Unuigitaj Nacioj okazis hodiaŭ la 2-an de Aŭgusto, je la dua kaj duono posttagmeze en Lake Success, en la Konferenca Ĉambro N-ro 13 de la UN-Sekretariejo. Kvar albumojn enhavantajn ĉiujn kolektivajn subskribojn kaj la plej gravajn individuajn akceptis nome de UN S-ro **Benjamin Cohen** de Ĉilio, Helpa Ĝenerala Sekretario de la Unuigitaj Nacioj kaj estro de ĝia Departemento de Publika Informado.

Ses membroj de la Esperanto-delegitaro faris paroladojn en Esperanto kaj en angla, franca, hispana kaj rusa lingvoj. Nome de UN la Helpa Ĝenerala Sekretario deziris planan sukceson al la klopodoj de la Esperanto-movado. Li promesis oficiale informi la Ĝeneralan Direktoron de UNESCO, S-ron Jaime Torres Bodet pri la transdono de la Esperanto-Petskribo. Li diris, ke li komprenis preskaŭ ĉion, kion ses Esperantistoj—naskitaj en 6 diversaj landoj—diris en Esperanto. Li aidonis, ke la flueco, kun kiu ili parolis la lingvon, forte impresis lin. S-ro Cohen ankaŭ menciis, ke la Esperanto-eldono de la Universala Deklaracio de Hom-Rajtoj, preparita kaj eldonita de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko, troviĝas en la oficiala listo de eldonaĵoj de la Departemento de Publika Informado de UN. S-ro Cohen dankis la Esperantistojn pro ilia promeso labori por internacia kompreno, tiamaniere plifaciligante la klopodojn de la Unuigitaj Nacioj.

La programo de la ceremonio estis jena: S-ro **Mark Starr**, Eduka Direktoro de la Sindikato de Laboristoj pri Virinvestoj, Vic-prezidanto de la Komitato de la Usona Registaro por Edukaj Interŝanĝoj, kaj Prezidanto de la Usona Delegitaro al UNESCO-Konferenco pri Edukado de Plenkreskuloj okazinta en Danujo on 1949, parolis angle kaj Esperante, rakontante pri siaj propraj spertoj kun Esperanto en Japanujo, Rusujo kaj aliaj landoj. Li diris, ke facila kaj neŭtrala helpa lingvo ebligas internaciajn rilatojn al personoj sen specialistaj lingva studado kaj ke Esperanto montris sian planan taŭgecon por tiu celo. En la historio de la Esperanto-movado S-ro Mark Starr certe restos konata, kiel la unua Esperantisto, kiu faris paroladon en Esperanto en la centro de UN.

La dua parolado estis tiu de D-ro **William Solzbacher**, Prezidanto de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko. Li parolis unue angle, poste

france kaj fine Esperante. "Nome de Universala Esperanto-Asocio kaj de la 16.350.212 personoj, kiuj individue aŭ per siaj organizoj subtenis la petskribon" li petis la Unuigitajn Naciojn, ke ili atentu kaj studu la spertojn jam faritajn pri la praktika uzo de Esperanto kaj ke ili subtenu pli vastan aplikadon en la estonteco. D-ro Solzbacher menciis la plej gravajn individuojn kaj kolektivajn subskribojn kaj diris, ke kvankam la grandaj asocioj kun centmiloj da membroj estas la plej gravaj, studo de la listo de malgrandaj asocioj subskribintaj montras la surprizan variecon kaj multflankecon de la intereso pri Esperanto. Uzante tri landojn kiel ekzemplojn, Norvegujon, Brazilon kaj Japanujon, li montris tion konkrete. Li ankaŭ memorigis la diskutojn pri Esperanto en la iama Ligo de Nacioj, dirante, ke la Raporto de la Ligo de Nacioj pri "Esperanto kiel Internacia Helpa Lingvo" (1922) meritas la intereson de la Unuigitaj Nacioj kaj ke la formulo uzita en Rezolucio de la Ligo de Nacioj en 1924 pri "Esperanto kiel praktika helpa lingvo por internaciaj rilatoj, flanke de la naciaj lingvoj uzataj" eble estos inda de konsidero en la Unuigitaj Nacioj.

Sekvis parolado de S-ro **Myron Mychajliw**, iama Redaktoro de *Ukraina Esperantisto*, en rusa lingvo kaj Esperanto. Poste S-ro **Floreál Conchado**, Fakdelegito de U.E.A. por hispanlingvanoj, paroladis hispane, angle kaj Esperante.

Profesoro **João B. Mello e Sousa** el Rio de Janeiro, Prezidanto de la Brazila Skolta Asocio kaj iama Ĝenerala Sekretario de la Brazila Esperanto-Ligo, faris treege impresan paroladon, unue en franca lingvo, poste en Esperanto, montrante la necesecon de Esperanto por lando, kies lingvo ne estas multe studata eksterlande.

La finan paroladon faris S-ro **H. Sloan**, Prezidanto de la Konsila Komitato de EANA. Li parolis unue en Esperanto, poste en angla lingvo, kaj laŭtlegis la tekston de la Petskribo. Li diris, ke la Esperanto-movado ne nur prezentas peton al UN, sed ĝi ankaŭ promesas sian helpon en la plifaciligado de internacia kompreno, unu el la esencaj taskoj de UN.

Sekvis la transdono de la Petskribo kaj la fina parolado de S-ro Benjamin Cohen. Ĉeestis kelkaj ĵurnalistoj. Ilia nombro estus estinta multe pli granda, se ne samtempe sensacia kunveno de la Sekurec-Konsilantaro sub la prezido de la Rusa Delegito, S-ro J. Malik, estus altirinta ilin.

(daŭrigo malsupre de sekvanta paĝo)

## Gazetara Servo

La unuan fojon oni povis organizi dum Esperanto-kongreso veran gazetan servon. La rezultatoj estas elstare bonaj, sed ne tiom, kiom ili devus esti. Fakte, estis provo. Estas necese, ke en venontaj kongresoj la dumkongresa kunlaboro de la alilandaj partoprenantoj estu pli efika. Ni ĉi tie raportas pri la organizado de la laboro, la sukcesoj kaj . . . la mankoj.

Ni multobligis ĉiutage du bultenojn, unu Esperantlingvan kaj unu nacilingvan (francan). Tiuj du bultenoj ne estis tradukoj unu de la alia ĉar ne estis destinitaj al la samaj personoj. La Esperantlingva estis destinita ĉu al kongresanoj, ĉu al la estraro de la kongreso por ties persona uzo, ĉu al Esperantistaj ĵurnalistoj, ĉu al kongresanoj kiuj havas—kvankam ili ne estas ĵurnalistoj—la eblon sendi artikolojn al eksterlandaj naciaj ĵurnaloj. Krome ĝi estis uzebla por Esperantaj gazetoj. La franclingva estis destinita al la franca ĵurnalaro, franclingvaj instancoj, ministerioj k.s.

La redaktadon prizorgis unu deĵoranto, kelkfoje du. Ili devis redakti, principe, laŭ tekstoj al ili komunikitaj de respondeculoj de ĉiu okazintaĵo (kunsidoj de sekcio, de ĝenerala kunsido, de fakaj kunsidoj). Fakte, **multaj el tiuj respondeculoj tute ignoris la gazetan servon** tiel, ke la



*S-ro O. T. Nicolaisen,  
Konstanta  
Kongresa Sekretario*

redaktoroj devis, aŭ redakti mem la okazintaĵojn, kiujn ili ĉeestis (kaj la laboro mem de la bulteno malpermesis ke ili ĉeestu multajn) aŭ tute rezigni. Pro tiu manko de la respondeculoj helpi la gazetan servon, la bultenoj ne povis esti tiom kompletaj, kiom dezirinde.

Por helpi la redaktorojn ni bezonis du skribmaŝinojn—unu por la Esperanta eldono, la duan por la franca. Krome, deĵoranton por la multobligiga maŝino, kaj kelkajn aliajn por la kunmetado de la diversaj folioj, faldado kaj enmetado en la kovertojn. La redaktoroj devis ankaŭ preni sur sin tiun laboron!

Grava manko estis, ke neniu estis speciale komisiita akcepti la gazetistojn (kiuj venis multaj) aŭ doni informojn. Ni estis senĉese ĝenataj pro la alvenado de eksteraj personoj, kio malfruigis la laboron. Estas absolute necese, ke en venonta gazetara servo tiu laboro estu apartigita inter la informdona servo kaj la redakta servo. Unu respondeculo devas kapabli informi, dum la aliaj redaktas aŭ faras materialan laboron.

*(daŭrigo de paĝo 126)*

Krom la 6 Esperantistoj—naskitaj en 6 diversaj landoj—kiuj faris la paroladojn, la jenaj personoj ĉeestis kiel membroj de la Speciala Delegitaro por la Transdono de la Esperanto-Petskribo:

*S-ro James D. Sayers, Komitato de U.E.A.*

*S-ro Harry Harrison, Kasisto de EANA, FD. de U.E.A.*

*S-ro Gilbert Nickel, Estrarano de EANA, Del. de U.E.A.*

*S-ro Donald Stephens, Del. de U.E.A.*

*S-ro George W. Bailey, Prezidanto de American Radio Relay League (asocio de 60.000 radioamatoroj) membro de la Konsila Komitato de EANA.*

*Komandanto Richard E. Lambert, fama mondvojaĝanto kaj unu el la unuaj Esperantistoj en Usono.*

*S-ro Affonso H. Correa el Brazilo, oficisto de Pan-Amerika Unio kaj aŭtoro de bonega artikolo en ties gazeto Americas.*

*S-ino Muriel Collins Lambert, verkistino kaj lingvistino.*

Krome ĉeestis ankoraŭ ses gesamideanoj, inter ili S-ino Mello e Souza (Brazilo), S-ino Elise Lippmann, S-ino Lola Mae Muse (New York).



*S-ro J. Couteaux,  
Kongresa Sekretario  
por la 35-a en  
Parizo*



La Kongresa balo

[Foto: Eclair-Continental]

Cetere, gazetara servo devas esti malferma dum la tuta tago. Ni ne povis garantii tian ĉeestadon ĉar ni estis tro malmultaj. Ni estis ĉirkaŭ sep personoj (ne la sama nombro ĉiutage ĉar bonvoluloj kelkfoje forgesis veni, kaj estas nefacile al ili riproĉi). Krome, la gazetara servo havis ankaŭ la taskon organizi radio-elsendojn, kio postulis multan klopodadon kaj longan tempon. Ni entute organizis inter 20 kaj 25 elsendojn en pli ol 10 lingvoj.

Unua konkludo: la personaro de la gazetara servo devas esti pli multnombra ol dum la Pariza Kongreso kaj devas konsisti el personoj pri kies ĉeesto kaj laboro oni povas esti absolute certa. Tio estas vera por la profesiaj ĵurnalistoj kaj enlandaj kunlaborantoj.

La bultenojn ni komence intencis eldoni je la 16-a horo. Pro la jam diritaj kaŭzoj ni sukcesis nur je la 18-a. Estus dezirinde, ke la nombro de la partoprenantoj en la servo estu sufiĉe granda por ebligi pli fruan aperon.

La Esperantlingvajni ni disdonis en la oficejo mem de la servo al tiuj, kiuj ilin bezonis. Aparta ejo por la disdonado estus dezirinda.

La franclingvajni ni enkovertigis kaj sendis perpoŝte sufiĉe frue por atingi la provincajn gazetojn dum la sekvanta mateno. Por la Parizaj ĉefaj matenaj gazetoj faritaj dumvespere ni organizis servon, kiu portis ilin tuj post la apero tiel, ke la materialo povu esti uzata por la morgaŭa ĵurnalo.

La disdonado de la bultenoj estas plej grava afero ĉar estas senutile ilin redakti kaj presi se ili ne atingas ĝustatempe la koncernatojn. La aranĝo de tiu disdonado devas esti farata de profesia loka ĵurnalista, kiu konas la kutimojn kaj tagojn kaj horojn de laboro en naciaj gazetoj.

Estas necese, ke la gazetara servo abonu tian agentservon, kiu sendas eltondaĵojn de gazeto pri iu temo (ekzemple pri "la kongreso de Esperanto"). Tion ni ne disponis en Parizo. Tial nur laŭ diversaj hazardoj ni povis kontroli la efikon de niaj francaj bultenoj. Ni konstatis, ke multaj gazetoj uzis ilin aŭ, interese pri Esperanto post ricevo de nia bulteno, sendis reprezentanton. Sed kontrolon de la tuto de nia agado ni ne povis fari.

N  
gaze  
por  
N  
skri  
forg  
nur  
sed  
ĉu F  
en l  
ni t  
ni b  
ĉam  
serv

V  
kong

Basi

C  
kong  
havo  
inter  
kam

D  
Adm

Cow  
la u  
tutt

L  
la A  
prov

Or  
prec  
farac  
tasko



Svedaj gedancistoj en la U.K., Parizo

[Foto: Eclair-Continental]

Ni atentigas niajn posteulojn en venontaj gazetaraj servoj pri tiu demando, fakte grava por la orientado de la laboro.

Ni disponis relative vastan ĉambron kaj ok skribmaŝinojn, kiuj apenaŭ sufiĉis. Oni devas ne forgesi, ke la gazetara servo havas la taskon ne nur arigi la informojn kaj pretigi la bultenojn, sed krome disponigi al la dezirantaj ĵurnalistoj, ĉu Esperantistaj, ĉu eksteraj de la kongreso, ejon en kiu labori, kaj ĉiujn faciligaĵojn. Mankis al ni telefonaparato en nia ĉambro mem kaj, kiam ni bezonis ĝin, (kio estis ofte) ni devis iri en alian ĉambron. Estus tre dezirinde, ke en la gazetara servo mem ekzistu unu aŭ pluraj telefonaparatoj.

Vizitis nian servon kaj postulis bultenojn kongresanoj eksterlandaj, kiuj sendis artikolojn

al naciaj gazetoj, multaj lokaj francaj ĵurnalistoj neesperantistaj, kiuj krom la bultenoj, petis informojn diversajn kaj plejofte petis ke ni promenu kun ili en la kongresejo por fari intervjuojn pere de Esperanto kun eksterlandaj kongresanoj, kaj korespondantoj de eksterlandaj gazetoj en Parizo, diversaj reprezentantoj de oficialaj servoj kaj organizaĵoj, kiaj Ligo de Instruado, Urbdomaj servoj, Ministerio de Informado, Akademio de Parizo, Konsilantaroj de ĉirkaŭ-urboj, Unesco k.t.p. Ni faris nian eblon kaj tiel skeptikuloj estis konvinkitaj. Tia propagando estis bonega sed postulis multan tempon. Pro tio ni denove insistas pri la punkto, ke gazetara servo en Esperanto-kongreso devas esti sufiĉa (do kun multaj kunlaborantoj) aŭ tute ne esti.

**Basil McGrath :**

### ANTAŬKONGRESO EN ANGERS

Cent sepdek Esperantistoj aliĝis al la antaŭ-kongreso en Angers. Kian belan memoraĵon ili havos pri la bonaj manĝaĵoj en la liceo, pri longaj interesaj ekskursoj, kaj precipe pri agrabla kamaradeco inter samideanoj el dek kvar landoj !

Du fojojn la antaŭkongresanoj estis akceptataj, de la Vicurbestro de Angers kaj de la Administracia Direktoro de la Angersa ĵurnalo *Courrier de L'Ouest*, kaj krome de la Urbestro de la urbeto Saint Lambert du Lattay. Oni faris tri tuttagajn ekskursojn.

La normo de lingvo-uzado estis kontentiga, kaj la Angersanoj kun la helpo de S-ro Buckley provizis distraĵojn, kiuj bone sukcesis.

Oni ŝuldas dankon al la lokaj samideanoj kaj precipe al F-ino Nouais kiu tiel kompetente faradis, ĉiam kun rideto, la rutinajn malfacilajn taskojn, al S-roj Fouski kaj Frangeul pro tempo

disponigita al ni dum la ekskursoj, kaj al Prezidanto de la grupo, D-ro Rousseau kaj lia edzino.



A. C. Blatt :

## Okcidentano Rigardas la Orienton

NIA MOVADO EN KOREO

(Ĉi tiun artikolon ni ricevis kaj kompostigis jam antaŭ la eksplodo de milito en Koreo, sed devis prokrasti la presigon pro premo de aliaj aferoj. La bildo ĉi tie prezentata des pli ĝas dolara la nunan konflikton en tiu malfelita lando. Red.)

Jam kelkajn fojojn mi komencis verki detalan raporton pri mia Esperanta vojaĝo al Azio sed ne trovis tempon por daŭrigi. Mi verkas ĉi tiun raporton kun nur unu celo: klare prezenti la situacion en la fora oriento por ke vi en la okcidento sciu kiel agi.

Nia movado celas al unu mondo, unu homaro, sed ĝi fakte ankoraŭ estas nur okcidenta, eŭropdevena. Nia en-azia duono troviĝas kvazaŭ sur alia planedo, ne en nia vivo, en nia koro. Kiom da okcidentanoj komprenas la urĝon, envenigi niajn orientajn fratojn en nian vivon, en nian movadon? Sekve de tendencoj politikaj estas nun urĝe, ke la orientanoj ekkonu nian okcidentan vivmanieron, sed ankoraŭ pli urĝe, ke ni en la okcidento konu iliajn morojn kaj manierojn de vivado!

Baldaŭ post la militfino mi petis de la tiama I.E.L. adresojn en Koreo. Eĉ ne unu adreson ĝi havis. Komenciĝis serĉo. "Esperanto? Kio estas?" aŭ "Ho jes, mi aŭdis pri ĝi, sed konas nenion..." aŭ "Ha jes, mi konis Esperantiston, sed li mortis." Post ses monatoj mi fine trovis! Mi trovis du samideanojn kun kiuj mi tuj tre amikiĝis. Kun la tempo ni fariĝis tre intimaj. Tio estis por mi kvazaŭ miraklo. Jam en Usono mi akiris tre strangajn sintenon kaj komprenon pri orientanoj. Mi klopodis eduki min en tiu rilato per aliĝo al diversaj grupoj—ekzemple *Oriento kaj Okcidento* de Pearl Buck—sed post jaroj neniam sukcesis. Tion tamen plenumis Esperanto—tuj! La *muroj de miljaroj* fandiĝis kiel ridinda neĝ-muro antaŭ la fajra spirito de Esperanto! Ĉia konscio pri diferenco malaperis kaj neniam aperis inter mi kaj la koreaj samideanoj.

Ĝis tiam mi ne parolis Esperanton. Mi legis, aŭskultis prelegojn sed parolis nur angle. Ili neniam antaŭe renkontis okcidentan samideanon. Ili sciis nenion pri la movado ekster sia lando. Ili ĝojis aŭdi pri la movado en Eŭropo.

Kiel okazis, ke nia movado ne posedis koreajn adresojn? La tirana japana registaro jam antaŭ multaj jaroj subpremis la Esperanto-movadon en Koreo. Oni enbatis la pordojn de samideanoj, priserĉis la domojn, konfiskis Esperantajn librojn, batis, turmentis senkore la Esperantistojn, detruis gazetojn kaj librojn en vendejoj, malpermesis

ĉian korespondadon kun la mondo Esperantista. Mallonge, demonstraciis ĉiujn konatajn fenomenojn de faŝisma perforto.

Du jarojn antaŭ mia alveno la Usona Armeo liberigis ilin. Jaron poste oni starigis kurson en unu kolegio sed pro la teruraj malfacilaĵoj la movado nerapide reviviĝis.

Post mia konatiĝo kun ili, oni anoncis kunvenon—kunsidon *pro la vizitanto de alia planedo!*

En la kunsido mi ĉirkaŭrigardis kun scivolo kaj ĝoje surpriziĝis. Dudekelke kunvenis. Ili kantis parkere *La Espero* (kaj mi ankoraŭ ne konis ĝin!) La plimulto povis paroli la lingvon, kaj en ĉi tiu *malprogresita* lando niaj samideanoj havis pli profundajn intereson kaj komprenon pri la progreso, ol mi konstatis ĉe multaj okcidentaj rondoj.

Post saluto de ĉiu ĉeestanto kaj kelkaj interdemandoj, sekvis tre longa kunsido de la Korea Esperanto-Instituto por plani vortaron, gazeton, kunsidojn kaj... ekspluaton de la vizito el la malproksimega homaro. Ni fotografiĝis. La kunsidon oni gvidis kun maksimumaj inteligento kaj kapablo.

Per tio komenciĝis 18 monatoj da kuna vivado. Oftaj vizitoj al la hejmoj de samideanoj, vagado tra la montoj kaj valoj, plenaj je belaj, interesaj sed malriĉegaj vilaĝoj, kamparoj... Klarigado pri antikvaj pentraĵoj, aŭskultado al malnovaj ĉarmegaj operoj, teatraĵoj, admiro al indiĝena arkitekturo: historio, moroj, religio, filozofio, ekonomio, politiko.

Interparolado, interkomprenado, homigo...

Okazis multaj propagand-kunvenoj, kursoj. Klopodoj ebligi kontakton kun eksterlandaj samideanoj. Akiri librojn... gazetojn... Ni ofte kunvenis en malvarma, senhejta ĉambro kun nur tableto kovrita per verda tuko, aranĝita kvazaŭ altaro. Tio estas karakteriza. Al nia movado la sinteno de niaj koreaj samideanoj estas preskaŭ pia.

Ĉu estas tre malfacile por Azianoj lerni Esperanton? Esperanto estas bazita sur okcidentaj radikoj kun kiuj koreaj, ĉinaj kaj japanaj radikoj havas nenian rilaton. En liceo, sen varmo dum treege malvarma vetero, kun surtuto, frapante la brakojn, ni instruis Esperanton en la ferio-sezono. Ni uzis rektan metodon. Post ses horoj ĉiuj studentoj-komencantoj povis interparoli.

La situacio ĉiam ŝanĝiĝas, sed la kaoso kaj malfacilaĵoj daŭras. Tamen la klopodado de la

(daŭrigo sur paĝo 133)

teksto  
En  
ke ne  
rivalo  
alia  
Steine  
tiom  
morti  
konce  
la Jar  
ne po  
estas  
koresj  
kripli  
multa  
por o  
prote  
ankor  
La  
eblaj  
la tut  
degar  
prese  
ekzer  
(p.  
Stelo,  
Gaze  
Aalst  
Jarll  
plejn  
ŝajne  
de l  
posec  
citas  
la d  
F-inc  
estas  
S-ro  
Lond  
adre  
Mida  
mia  
1948  
adre  
S-ro  
la n  
nom  
mort  
Pr  
sed  
ema



# TRA LA LIBRARO

\*=akireblaj ĉe U.E.A.



**Tutmonda Adresaro de Esperantistoj** de Hugo Steiner, sub la aŭspicioj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien. Ofseta represo de tajpitaj

tekstoj; 20 × 14.5 cm. 154 p. broŝ. prezo 12 rpk.

En siaj *Enkondukaj Vortoj* la kompilinto skribis ke neniam estis lia intenco ke la *Adresaro* estu rivalo al la Jarlibro de U.E.A. ĉar ĝi servas al tute alia celo. Mi plenkore konsentas kun S-ro Steiner, ke ĝi ne estas rivalo al la Jarlibro. Libro tiom plena de eraroj, kun nomoj kaj adresoj de mortintoj, kaj nomoj presitaj sen la permeso de la koncernaj personoj neniel povas konkurenci kun la Jarlibro. La duan konstaton de la aŭtoro mi ne povas kompreni, ĉar li ne klarigas ĝuste kio estas tiu "tute alia celo". Ĉu estas adresaro de korespondemuloj? Se jes, ĝia utilo estas grave kripligita de la fakto ke en ĝi troviĝas nomoj de multaj personoj, kiuj ne havas la necesan tempon por ordinara korespondado, kaj mi scias ke kelkaj protestis post la antaŭa eldono, sed la nomoj ankoraŭfoje aperas. Por kiu alia celo ĝi servu?

La 72-jara S-ro Steiner senkulpigas sin pri eblaj preseraroj dirante ke li mem maŝinskribis la tuton kaj faris por la *Adresaro* pezan kaj grandegan laboron. Pro tio, mi ne atentigos pri preseraroj, kiuj abundas, sed donos nur kelkajn ekzemplojn de la multaj aliaj eraroj en la libro.

(p. 16/17) La gazetoj *Kompreni* kaj *Verda Stelo*, kiuj aperas en listo de la Esperanto-Gazetaro, ne aperis dum du jaroj; (p. 39) la urbo *Aalst-Waalre* ĉi tie sub Belgujo, aperas en nia Jarlibro sub Nederlando; (p. 43/58) *Britujo*—la plejmulto de tiuj adresoj kiuj estas fidindaj oni ŝajne ŝtelis el la Jarlibro de U.E.A. sen la permeso de la koncernaj personoj aŭ de U.E.A., la posedanto de la kopirajto. El la malĝustaj mi citas la jenajn:—*Brentford*: S-ro Clissold forlasis la donitan adreson antaŭ 2 jaroj, *Edgware*: F-ino Caw loĝas ĉe la donita adreso, kiu tamen estas en Edinburgh, sed ne en Edgware! *Harlow*: S-ro Finch formigris al Aŭstralio antaŭ du jaroj, *London N.W.6*: S-ro Farrand aperas sub du adresoj—unu nova, unu malnova, simile ĉe S-ro Midas, *London W.2* kaj *S.E.23*. *London N.22*: mia onklo, S-ro Robertson, mortis en Februaro 1948, *London E.4*: S-ro Verda forlasis la donitan adreson antaŭ jaroj, *Harpendon* kaj *Watford*: S-ro Coventry troviĝas sub ambaŭ lokoj. Krom la menciitaj ekzemploj aperas sub *Britujo* la nomoj de almenaŭ ses aliaj samideanoj kiuj mortis, kaj multaj adresoj, kiuj ne plu validas.

Pri aliaj landoj mi ne povas egale bone kontroli, sed se por unu lando estas tiom da eraroj, oni emas opini, ke ili ekzistas ankaŭ por la aliaj.

Imagu la efikon je nova Esperantisto, kiu volas korespondi, sed pro la multaj eraroj ne ricevas respondon!

Dum multaj jaroj mi bone konis S-ron Steiner. Mi ĉiam admiris lian senĉesan strebadon por Esperanto kaj la bonajn rezultojn kiujn li de tempo al tempo atingis. Sekve, kun granda bedaŭro mi devas diri pri la *Adresaro*, ke S-ro Steiner ne honorinde agis aperigante tiom da nomoj senpermeso kaj malgraŭ protestoj, kaj ke lia granda laboro por la libro estas misdirektita, ĉar tia erariga volumo ne povas alporti bonon al la movado.

A. C. Oliver.

**(Noto de la Centra Oficejo de U.E.A.** En la *Adresaro* troviĝas instrukcio, ke aĉetantoj povas pagi al Ĉefdelegitoj de U.E.A. Tio estas nevera. U.E.A. neniam donis tiun permeson).

**\*Malsato en riĉa rikolto** de S. Tokunaga; eljapanigis kaj ilustris Kojiro Nakagaki; eld. Toga-Sobo, Tokio 1949. 18 × 12.5 cm. 46 p. broŝ., prezo

Temas pri skize rakontita klasbatala epizodo el la konflikto inter mez- kaj et-bienuloj unuflanke kaj malriĉaj kamparanoj aliflanke. Per komuna agado ĉi-lastaj sukcesas ruze reakiri en aŭkcio rizkampojn, kiujn poste ili komune prifalĉas. Neĵapanojn interesos la naciaj vivkondiĉoj, kiujn aldonitaj Esperanto-notoj de la tradukinto klarigas. Tamen restas kelkaj prilingvaj demandoj, kiujn la eŭropa leganto nur divene solvas (ekz. *enmanaĝo* p. 11) kaj kiujn pluaĵ notoj povus komprenigi se tiuj notoj ne estus donitaj japanlingve. Krom nekutimaj, sed lingve interesaj, parolturnoj mi trovis kelkajn malĝustajtojn: *forpreni al* (forpreni de) p. 2, *glitema vojo* (glitiga) p. 9, kaj dekduon da preseraroj. Ne laŭ mia gusto estas la ĉiama *de l'* kaj la ĉi tie nenecesa *oza*. Tamen interesa broŝuro, kiu pruzas, kiel taŭga nia lingvo estas ankaŭ por azianoj.

Erich Dahlmann, Berlin.

**Monda Federacio** de Tom O. Griesemer. Faldfolio eldonita de World Student Federalists, 20 Buckingham St., London, W.C.2, Anglujo. Prezo nemontrita.

**Varna**: ilustrita faldfolio pri la bulgara restadejo. Eldonis Balkanturist. (adreso ne donita).

## GRAVA SCIIGO

D-ro W. Solzbacher, Prezidanto de E.A.N.A., ricevis leteron kun dato 10 aŭg. 1950. el Lake Success, en kiu Sinjoro B. Cohen, Helpa ĝenerala Sekretario de U.N. informis lin, ke "*laŭ instrukcioj de la Ĝenerala Sekretario la Petskribo kaj la subtenaj dokumentoj estas transdonitaj al UNESCO*". En la sama letero S-ro Cohen denove esprimis sian plezuron pri la ricevo de la Esperanto-Delegitaro la 2-an de aŭgusto.

## LA BRITA JUNULGASTEJA MOVADO



**Lownard Junulgastejo.** Tipa gastejo de la frua speco. Malnovmoda pajltegmenta kamparana dometo adaptita por la uzo de la junularo. (Foto de J. Ingham).

En 1930 la Junulgasteja Asocio de Anglujo kaj Kimrujo (Youth Hostels Association) estis fondata de malgranda rondo de pioniroj, kiuj tre volis kontentigi la bezonon de ĉiam kreskanta nombro de gejunuloj kun limigitaj monrimedoj, kiuj volis vizitadi la belegran Anglan kamparon sed ne povis pagi la prezojn por tranokta restado en la kutimaj gastejoj kaj pensionoj. La provizo de gastejoj tamen ne estis la sola celo de la Asocio ĉar la statuto klarigas ankaŭ aliajn: "helpi ĉiujn homojn, precipe gejunulojn neriĉajn, al pli-ampleksaj kono, amo kaj zorgo pri la kamparo, aparte per provizado de gastejoj kaj alispecaj simplaj loĝejoj por iliaj ekskursoj."

Jam antaŭ Pasko 1931 pli ol 20 gastejoj estis inaŭguritaj en diversaj partoj de la lando, kaj jam antaŭ la jarfino la nombro pligrandiĝis ĝis preter 70. De tiam la Asocio regule kreskas kaj nun havas preskaŭ 300 gastejojn kaj pli ol 200.000 membrojn. Ĉi tiuj gastejoj neniel estas stereotipaj; la diverso de la domoj ja estas unu el la plej agrablaj trajtoj de la J.A. (Y.H.A.). Iuj domoj estas farmaj aŭ burĝaj domegoj, grenejoj aŭ muelejoj adaptitaj por la nuna uzo, kaj ili inkluzivas eĉ aliigitajn trinkejon kaj ŝafgardistan kabanon en ilia nombro. Troviĝas ankoraŭ kelkaj, kiujn oni specife konstruigis.

La Asocion direktas dek naŭ aŭtonomiaj aŭ duon-aŭtonomiaj regionaj grupoj, kies estraro aŭ komitato estas ĉiujare elektata per ĝenerala aŭ delegita kunveno. La ĉefa funkcio de la regiona grupo estas la inaŭguro kaj administrado de gastejoj sur sia tereno. Reprezentantoj de la regionaj grupoj kunvenas ĉiujare en la Landa Estraro, kiu estas la plej supera instanco de la Asocio. El la Landa Estraro reprezentantoj de

la regionoj estas elektataj al landa administra komitato, kiu prizorgas la centran administradon dum la jaro. Tiu strukturo certigas egalpezon kaj harmonion inter la memstarema regiona sendependeco kaj la unuiga influo de la Landa Estraro kaj komitatoj. Inter la societoj aliĝintaj al la J.A. (Y.H.A.) estas la Brita Esperanto-Asocio.

La J.A. enlande ne principe disponigas organizitajn aranĝojn por siaj membroj, kiujn oni admonas fari la proprajn planojn por la esplorado de la kamparo. Escepto estas la organizado de pluraj eksterlandeniraj laborgrupoj, per kiuj la anoj sin devigas akcepti taskon, kutime en rilato kun la riparado aŭ dekorado de transmara gastejo. Dum tiaj karavanoj la membroj pagas siajn proprajn elspezojn.

Ekzistas tamen multaj lokaj grupoj tra la lando, ligitaj al la Regiona Grupo, kaj tiuj organizas agadon, kiel ekzemple vizitojn al specifaj gastejoj, prelegojn, diskutojn kaj festajn vesperojn. Membreco de tiaj grupoj estas dezirinda, sed ne deviga.

La Asocio estas membro de la Internacia Junulgasteja Federacio, al kiu estas filiigitaj la junulgastejaj asocioj de pli ol 20 landoj. Ĝi disponigas Internacian Vojaĝ-Oficejon, kiu donas al membroj konsilojn pri eksterlanda vojaĝado kaj provizas landkartojn kaj literaturon. La Vojaĝ-Oficejo krome helpas al eksterlandaj gastejuloj volantaj viziti Anglujon.

Granda postulo pri loĝado malfaciligis la akcepton de ĉiuj, kiuj volis viziti Anglujon kaj



**Gastejo New Eskdale.** Jen tute nova gastejo speciale konstruita de la Asocio en la Valo de la Esk (lagregiono). Ĝin karakterizas neordinara komforto tia, ke kiam la veteranoj unue ĝin vizitis, ili eĉ blasfemis kaj akuzis, ke tio estas perfido de la spirito de la movado. Ĝi ne estas sufiĉe primitiva! (Foto de G. Ingham).

Patter

Kimruj  
pasigis  
junulga  
multe  
Intern  
dum la  
junulga  
laŭ inf

Harti  
la soc  
meza  
impos  
kamp  
feŭda  
baron  
La bi

Veron  
de V  
havebl  
Veron  
ĝis val



**Patterdale**, Ullswater. Lagregiono. Tipa gastejo en la Wordsworth-tereno.

Kimrujon, sed malgraŭ tio eksterlandaj gastoj pasigis dum 1949 78.000 tranoktojn en Anglaj junulgastejoj. Estas verŝajne, ke la nombro estas multe pli granda en 1950 pro la okazigo de la Internacia Konferenco kaj Renkontiĝo en Anglujo dum la somero. Varma bonveno atendas ĉiujn junulgastejanojn, kiuj povas veni. (*Kompilata laŭ informoj donitaj de B. Traynor, de la Y.H.A.*)  
M. Otiel



**Hartington Hall**, Derbyshire. Karakteriza trajto de la sociaj tendencoj en Britujo estas la malapero de la mezaj klasoj. Precipe pro la altegaj testament-impostoj multaj nobeloj kaj burĝoj rezignis pri siaj kamparaj domoj, kiuj antaŭe estis hejmoj de feŭdaj bienuloj. Jen tipa ekzemplo de mezepoka barona domo, kiun akiris la Junulgasteja Asocio. La bienon oni projektas inaŭguri kiel nacian parkon.  
(Foto de J. Ingham).

**Verona** : 8-paĝa ilustrita gvidfolio, eldonita de Verona Esperanto-Asocio. Ekzempleroj haveblaj ĉe S-ro A. L. Reni, Via Rovereto 6, Verona, Italujo, kontraŭ nenuligitaj poŝtmarkoj ĝis valoro de afranko por eksterlando.

**KIO ESTAS VIA V.-K. ?**

Kompilas S-ro A. S. Beuker, Bijenhofstr. 34, Leeuwarden, Nederlando.

Divenu la ĝustajn el la signifoj donitaj ĉe la sekvantaj vortoj. Se vi ĝuste elektas ĉiujn via Vort-Kvociento estas 100. Tamen deprenu 10 por ĉiu miselekto aŭ nescio.

1. **Brokanti** : (a) brulvundi, (b) komerci pri malmulte valoraj objektoj, (c) kudre ornami teksaĵon ?

2. **Promontoro** : (a) elstaraĵo, (b) altebenaĵo, (c) alta terpinto antaŭeniganta en la maron ?

3. **Nomado** : (a) migranta homo, (b) fakesprimo, (c) birdo ?

4. **Aktuala** : (a) interesa pro freŝdateco, (b) modernega, (c) farebla, praktikebla ?

5. **Diafana** : (a) anĝeleca, (b) rabega, (c) trairebla per lumradioj ?

6. **Munti** : (a) kunmeti la partojn de maŝino, (b) supreniri, (c) monfari ?

7. **Obtuza** : (a) nebule malklara, (b) malsaĝa, (c) malgaja ?

8. **Efemera** : (a) longtempa, (b) rapide pasanta, (c) tre delikata ?

9. **Minareto** : (a) speco de kanto, (b) turo de moskeo (c) lumturo ?

10. **Poldero** : (a) altaĵo, (b) kavaĵo, (c) tereno gajnita el maro ?

La respondojn vidu sur paĝo 134

(daŭrigo de paĝo 130)

koreaj samideanoj daŭras kaj la movado kreskas. Jam aperis vortaro. En januaro 1950 ekaperis mimeografa gazeto kun belaj desegnoj. En ses kolegioj oni instruas Esperanton (unu devige). Kvankam ili estas malriĉegaj, niaj koreaj samideanoj ne petas helpon, nur la rajton kunlabori en la komuna tasko, starigi fortan universalan Esperanto-movadon.

Al ni en la okcidento ankoraŭ mankas scio, eĉ la plej simpla, pri niaj aziaj kunhomoj. Interesos ekscii, ke ĉe la homoj ekzistas alta stato de konscio pri la belo. Kvankam ili estas multe pli malriĉaj ol ni en la okcidento, ili tamen havas pli belajn domojn. Ili estas alte evoluintaj je la muziko. Eĉ en la plej malriĉaj tetrinkejoj oni povis aŭskulti diskojn de muziko de Schubert, Beethoven, Bach, Mendelssohn, Tchaikowski. Ĝazmuzikon **neniam** ! Ili faras multajn belajn artaĵojn (perlamotajn lakskatolojn kaj similajn luksaĵojn, broditajn tukojn diversajn, broditajn pentraĵojn) kiuj ofte bildigas koreajn scenojn aŭ pejzaĝojn. Koni koreanon signifas kontakti tiun indiĝenan arton, kiu estas revelacio por homo el la okcidento.

### S-ino Dave Hennen Morris

Pasis ekzakte 25 jaroj de kiam aperis nomo en nia movado, nomo kiu pli malfrue ligiĝis al eksperimento konata sub la titolo *International Auxiliary Language Association* (Int. Helplingva Asocio) aŭ simple IALA. Tio estis Sinjorino Dave Hennen Morris, naskita Alice Vanderbilt Shepard (1875) idino de la fama familio Vanderbilt. Ĉiuj kiuj partoprenis la 17-an kongreson de Esperanto en Genevo memoras la blankharan sveltan sinjorinon kiu, etendite sur longseĝo, sekvis la diskutojn en la Victoria Hall.

S-ino Morris multe subtenis nian movadon, financis diversajn valorajn eldonaĵojn, kiel ekzemple, *Bibliografio de la Internacia Lingvo* kompilitan de Petro Stojan, *Originala Verkaro de Zamenhof* k.a. Bonege parolanta Esperanton ŝi aliĝis jam en 1924 al U.E.A. kiel Dumviva Membro kaj ĉiam konservis amikecan sintenon al la Asocio.

Tamen ŝia speciala rolo estis en IALA, organizaĵo serĉanta la perfektan internacian lingvon. Pri tiu ĉi agado la opinioj inter ni disiras kaj estos al la tempo montri, kiu pravis. Tamen ni ne forgesu, ke el tiu ĉi agado rezultis valoraj konstatoj kaj konkludoj, kiujn niaj Esperantologoj povos utiligi.



Sinjorino Morris, edzino de konata advokato, amiko de Prezidanto Roosevelt, kiu nomis lin ambasadoro usona en Bruselo, partoprenis ankaŭ aliajn movadojn, Kristana Asocio de Junaj Virinoj kaj la Amerika Asocio de Universitataj Virinoj. La Universitato de Syracuse, N.Y., elektis ŝin Honora Doktoro. Tiu ĉi vivo en kiu ne mankis ĉagrenoj kaj seniluziigoj, estingiĝis la 15 aŭgusto 1950.

H.J.

### T.J.O.-JUNULAR-KUNVENO

En Konstanz (Germanujo) okazis la 6-a Internacia Junular-Kunveno de T.J.O. en la semajno antaŭ la U.K. en Parizo. Kunvenis 430 Esperantistaj gejunuloj el 17 landoj, inter tiuj landoj Irlando, Finnlando, Hispanujo kaj, por la unua fojo post la milito, Jugoslavujo. El la 430 junuloj, 350 estis negermanaj kaj tio emfazas la internacian karakteron de la renkontiĝo. La ĉefurbestro salutparolis en Esperanto kaj la Franca Altkomisaro donis kiel subvencion 1.000 germanajn markojn.

Pluraj kunsidoj kaj kunvenoj okazis kaj unu konkreta rezulto estis akcepto kaj forsendo de rezolucio al UN en Novjorko pledanta por rekono de Esperanto kiel interfratigilo de la homoj. Je la distra flanko okazis Nederlanda Vespero, Brita Vespero, ŝipekskurso al Bregenz, Germana Festvespero, ŝipekskurso al Schaffhausen, Franca Vespero kaj Adiaŭa festvespero (baló). La kunveno altiris grandan atenton en la germana gazetaro kaj la publiko ĝenerale alte taksis la fakton ke tiom diversnaciaj junuloj povis kunveni. Entute granda sukceso. La venontjara kunveno estos aŭ en Aŭstrujo aŭ en Nederlando.

### GRAVA INFORMO EL NEDERLANDO

#### Esperanto en la lernejo

Ni eksciis de fidinda flanko, ke la nederlanda Ministrejo por Instruado, Artoj kaj Sciencoj laboras super ŝanĝo de instruleĝo, kiu ebligos la fakultativan instruadon de Esperanto en la unuagradaj lernejoj.



#### KIO ESTAS VIA V.-K. ? (vidu p. 133)

1. (b) **Brokanti** signifas komerci pri malmulte valoraj objektoj.
2. (c) **Promontoro** estas alta terpinto antaŭeniĝanta en la maron.
3. (a) **Nomado** estas migranta homo.
4. (a) **Aktuala** signifas interesa pro freŝdateco.
5. (c) **Diafana** signifas trairebla per lumradioj.
6. (a) **Munti** signifas kunmeti la partojn de maŝino.
7. (a) **Obtuza** signifas nebule malklara. *Obtuza bruo de malapuda motoro.*
8. (b) **Efemera** signifas rapide pasanta. *La beleco de rozo estas efemera.*
9. (b) **Minareto** estas turo de moskeo.
10. (c) **Poldero** estas kulturebla tero gajnita el la maro.

E  
Sol  
Bruss  
Sol  
N-r  
nume  
koton  
N-r  
karen  
teista,  
Eni  
ĉi-sub  
Zame  
ajo - l  
aes - a  
ama -  
bez - l  
afe - ĉ  
Eni  
K...  
I...  
R...  
S... N  
B...  
A...  
R...  
A...  
O...  
P... \*  
\*... A  
\*... B  
\*... U  
T... \*  
R...  
R...  
O...  
V...  
R...  
K...  
S...  
A...  
P... I  
I... \*  
B... \*  
\*... U  
\*... N  
\*... I  
En  
sono,  
sapo,  
melo,  
egala  
ke ek  
de la  
Prov  
2. pli  
5. hej  
9. ko  
beste  
15. r  
kviet  
insek  
teksa

# ENIGMA KONKURSO N-ro 51

Solvojn sendu al S-ro P. H. Mooy, 20-A Avenue Molière, Brussel-Forest, Belgujo.

## Solvoj de la enigmoj en konkurso n-ro 49 :

**N-ro 107 :** rigora, figuro, barono, radiko, safiro, faruno, numero, kiraso, kokoso, teraso, mureno, baremo, kareso, kotona, tenoro, butono, tirano, perono, reduto.

**N-ro 108 :** rigida, detala, kateno, ignamo, idealo, eterna, kareno, kamero, metalo, latina, arniko, akordo, sterko, teista, kitelo, komodo, sitelo, elektri, modelo.

**Enigmo N-ro 109 : Perditaj proverboj :** Reordigu la ĉi-subajn litergrupojn tiel, ke vi trovos proverbojn el la Zamenhofa Proverbaro :

ajo - lad - lav - lpu - nma - omo - ran - tol - uen.  
 aes - aka - bon - ino - jsu - mut - ord - rda - tas - vir.  
 ama - apa - asl - asl - cel - lek - non - non - oni - sed.  
 bez - bon - evi - hav - iam - iam - one - osk - ruk - ŝpa.  
 afe - dep - ero - esi - inf - nae - ple - rom - roj - sla - sta - taj.

## Enigmo N-ro 110 :

K . . A . . \* . L .  
 . I . . O . . \* . O .  
 . . R . . L . . \* .  
 S . . N . . N . . \* .  
 . . B . . M . . \* .  
 . A . . U . . \* . O .  
 R . . O . . \* . I .  
 . . A . . \* . P . .  
 . O . . \* . I . . O .  
 P . . \* . G . . I .  
 . \* . A . . K . .  
 \* . B . . N . . O .  
 . \* . U . . O . .  
 T . . \* . S . . P . .  
 . R . . \* . D . . O .  
 . . R . . \* . A . .  
 O . . T . . \* . C . .  
 . V . . G . . \* . O .  
 . . R . . N . . \* .  
 K . . V . . K . . \* .  
 . . S . . R . . \* .  
 . A . . L . . \* . O .  
 P . . E . . \* . Z . .  
 . . R . . \* . I . .  
 . I . . \* . R . . O .  
 B . . \* . I . . T . .  
 . \* . U . . N . .  
 . \* . N . . A . . O .  
 . \* . R . . O . .

La ĉi subajn litergrupojn vi po tri kunligu tiel, ke ekestas vortoj. Tiujn vortojn vi metu en la figuron; de ĉiu vorto kelkaj literoj jam estas sur la gustaj lokoj. Kiam ĉiuj vortoj estas enmetitaj, la zigzaga linio el steletoj, montras proverbon.  
 abu - adj - ado - aer - ago - ale - amb - ano - ano - ast - ato - bri - bur - cio - cio - cio - cip - ĉan - das - ega - eks - ent - esk - eva - ezo - gio - har - hie - iko - ilo - ini - ino - kar - kav - kco - kio - kis - kod - kon - kro - kso - kur - lia - lim - lio - mar - mar - mik - mon - nee - nge - nse - nta - nto - nto - obs - oli - olo - olu - omo - ono - opl - opo - par - par - ped - pto - ran - rar - rev - rio - rof - ron - smo - soj - spo - sub - sub - ŝov - tam - tel - tra - tru - unk - uta - ven - vin

**Enigmo N-ro 111 :** anso, akto, pano, rodo, neĝo, okro, sono, poro, taso, poro, skio, milo, pura, maro, piro, arto, sapo, mono, sano, reto, foko, milo, lago, nano, mammo, melo, esti. Dividu ĉiun el la ĉi-supraj vortoj en du egalajn partojn kaj metu tri literojn inter tiujn partojn tiel, ke ekestas vortoj laŭ la ĉi-subaj signifoj. La mezaj literoj de la novaj vortoj tiam formas proverbon el la Zamenhofa Proverbaro. Jen la signifoj de la serĉotaj vortoj : 1. frukto ; 2. plilautigo de voĉo ; 3. rezigno pri puno ; 4. konstruaĵo ; 5. hejma vestaĵo ; 6. monato ; 7. virina voĉo ; 8. malsano ; 9. konifero ; 10. malmola vulkana substanco ; 11. danĝera besteto ; 12. mirindegaĵo ; 13. koloro ; 14. laŭcela irado ; 15. monero ; 16. arbeto ; 17. guberniestro ; 18. dolor-kvietigilo ; 19. spicaĵo ; 20. provizora regnestro ; 21. insekto ; 22. frukto ; 23. danĝera fenomeno ; 24. kotona teksaĵo ; 25. plena senaktiveco ; 26. frukto ; 27. akompani.

# ESPERANTO KAJ RADIO

*Mallongigoj :* I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

<b>Ĉiutage</b>	18.45-19.00	Sofia. 39.11m. P. Radio Sofia.
<b>Dimanĉo</b>	16.00-16.20	Roma. 25.2m. 31m. I. Radio-diffusioni Per L'Estero — Esperanto—Via Veneto 56, Roma, Italujo.
<b>Lundo</b>	05.30-05.35	Wien. 513m., 25m., 30m., 41m., 48m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a., Wien IV.
	07.15-07.30	Stockholm. 19.80m., 49.46m. P.
	15.15-15.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7, Svedlando.
	16.30-17.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. Rádio Ministério da Educação e Saúde, Rio de Janeiro, (DF), Brazilo.
<b>Mardo</b>	01.15-01.30	Stockholm. 19.80m., 27.83m. P.
	11.50-11.55	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neugasse 28, Bern.
	17.35-17.40	Bern. Kiel je 11.50, sed anst. 13.94m. sur 19.60m. (Krom la unua mardo).
	23.45-24.00	Gvatemalo. 49m. I. Estación Cultural de la Voz de Guatemala, Guatemala Cd. C. Ameriko.
<b>Merkredo</b>	19.15-19.30	Warszawa III. 48.23m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszydowa 8.
<b>Ĵaŭdo</b>	11.55-12.00	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
	17.35-17.40	Bern. Kiel marde. D-ro Privat.
<b>Vendredo</b>	08.05-08.20	Paris. 347m., 48.39. K.
	16.00-16.20	Roma. Kiel dimanĉe.
<b>Sabato</b>	22.15-22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

**Klarigo**—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

**Grave !** Ni kun granda bedaŭro anoncas la ĉesigon de la dissendoj sur ĉiuj ondoj, de la stacioj en Ĉeĥoslovakujo. Tio lasas nur la bulgaran stacion Sofio en la kategorio de ĉiutagaj elsendoj. Konsidere al la grava rolo de la ĉiutagaj elsendoj en la Esperantista vivo, ni tre forte admonas ĉiujn samideanojn skribi al la instancoj en ĈSR por esprimi sian dankon kaj kontenton pri la radio-elsendoj kaj peti eĉ pli da uzo de Esperanto. Se ni mem ne montras aktivan intereson en la uzado de Esperanto en la radio, ni ne rajtas plendi pri forlaso flanke de la instancoj respondaj pri tio. **Skribu amase !**

**Ĉu viaj amikoj estas membroj de U.E.A. ?**  
**Se ne, varbu ilin !**

# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

## OFICIALA INFORMILO

N-ro 230

9-an de Septembro 1950

### DELEGITOJ

#### Andoro

**Encamp.** FD (Industrio) : J. Travasset Pijoan, Hotel Miquel Alis.

#### Aŭstralio

**Ballarat** (Victoria). D : D. Brkić, 411 Havelock St.

VD : K. Podenas, 608 Eyre St.

**Sydney** (N.S.W.). D : K. L. G. Smith, 7 Arbutus St., Mosman. Tel : XM 1038.

#### Belgujo

**Eupen.** D : Pastro R. Ernst, Am Kloster 2. Tel : 1852.  
FD (Religio) : La D.

#### Brazilo

**São Paulo.** FD (Teozofio) : F-ino E. Vasconcellos, Rua General Rondon 81, Apt. 305.

#### Germanujo

**Krefeld.** FD (Blinduloj) : O. Brandt, Marktstraat 230. Tel : 20296.

**Stuttgart.** D : J. R. Resewski, \*3 Am Seelachwald, Stuttgart-Weilimdorf.

**Wuppertal.** D : J. Grundhoff, Eichenstrasse 56 Wuppertal-Barmen. Tel : 5 83 10.

#### Islando

**Siglufjördur.** D : J. P. Thorsteinsson, Hvanneyrarbraut 2.

#### Kanado

**Duncan, B.C.** FD (Socikredito) : H. P. Devenish. Tel : 504.L.3.

#### Svedujo

**Änäset.** D : Gösta Hansson, ĉefinstruisto. Tel : 150.

#### Venezuelo

**Maracaibo.** D : T. Sekelj, Carretera Unión, Calle Coromoto 6, Quta Tibidabo.  
FD (Etnologio) : La D.

### DUMVIVA MEMBRO

Lee-Min Han, S-ro, Kowloon, Hongkongo.

### MEMBRO-SUBTENANTOJ 1950

286. Planck, S-ino M. L., Kitzbühel, Aŭstrujo.

287. Cettini, S-ro G., Perth, Aŭstralio.

288. Zeiner, S-ro B. R., Barry, Kimrujo.

**DONACOJ.** G. Delanoue 10s., "Espero" 2s. 6p., R. H. K. Hill 7s. 6p., H. Gittens 7s. 6p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

**JARLIBRO 1951** : La jarlibro por 1951 aperos jam en januaro. Tial sendu ĉian materialon por tiu eldono jam nun. Por certigi al vi maksimuman utilon per tuja kaj plej frua uzado de la jarlibro, **PAGU VIAN KOTIZON JAM NUN !**

"**ESPERANTO**" en januaro havos novan formaton, kaj estos pli interesa, pli riĉenhava kun multaj ilustraĵoj. Fariĝu **Membro-Abonanto jam nun !**

**STATISTIKO.** Jen la stato de la membraro je la fino de Aŭgusto, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Aŭgusto 1949 :

	1949	1950
Asociaj membroj ..	6699	7063
Individuaj membroj :		
MJ .. .. .	766	837
MA .. .. .	4247	4179
MS .. .. .	359	288
Patronoj .. .. .	15	15
DM .. .. .	184	206
HM .. .. .	59	56
	<hr/> 5630	<hr/> 5581
	<hr/> 12329	<hr/> 12644

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario*

### INTERNACIA KONKURSO 1950

Stato je la 31-a de Aŭgusto

	Poentoj	Kvoto	%
1. Hispanujo ..	1135	600	189.2
2. Maroko ..	435	250	174.0
3. Izraelo ..	310	250	124.0
4. Germanujo ..	2350	2000	117.5
5. Aŭstrujo ..	815	700	116.4
6. Urugvajo ..	290	250	116.0
7. Sud-Afriko ..	285	250	114.0
8. Finnlando ..	1985	1800	110.3
9. Francujo ..	5685	5200	109.3
10. Aŭstralio ..	970	900	107.8
11. Belgujo ..	2134	2000	106.7
12. Svedlando ..	5190	4900	105.9
13. Italujo ..	1495	1450	103.1
14. Svislando ..	1335	1300	102.7
15. Brazilo ..	2253	2200	102.4
16. Nederlando	4991	5100	97.9
17. Kanado ..	235	250	94.0
18. Britujo ..	11629	12500	93.0
19. Danlando ..	2820	3100	91.0
20. Nov-Zelando	761	850	89.5
21. Usono ..	2664	3100	85.9
22. Irlando ..	190	250	76.0
23. Argentino ..	755	1000	75.5
24. Islando ..	470	660	71.2
25. Hungarujo ..	915	1400	65.4
26. Norvegujo ..	930	1500	62.0
27. Pollando ..	1900	4650	40.9
28. Egiptujo ..	95	250	38.0

Oni konstatas malmultan ŝanĝigon je la respektivaj pozicioj de la landoj en la tabelo. La somera sezono, kun la iom nebula fonda situacio, verŝajne kontribuis al tio. Ĉu ni bezonas atentigi, ke ĝuste nun en la lastaj monatoj de la jaro la konkurencantoj povas, se ili decide kaj fervorege laboras, fingsigeli sian triumfon? Al delegitoj ni ankoraŭfoje avizas, ke en la plej sukcesa lando **ĉiu delegito ricevos libro-premion.** Do jen bona okazo servi ne nur al la movado, al la asocio, sed ankaŭ al vi mem! Antaŭen!

# PROFITU LA OKAZON!

Poŝta respondkupono nun valoras 4p. anstataŭ 3p. en Britujo. Tio signifas prezredukton 25% por tiuj kiuj povas mendi nur per respondkuponoj. Jen mallonga listo de diversaj verkoj kiujn oni povas tiel mendi avantaĝe, sed notu ke tiuj prezoj en rpk. validas nur ĉe UEA. La sendkosto estas enkalkulita. Ne forgesu, ke rpk. havas valoron nur se ĝi estas stampita de la eldona poŝtoŝicejo en la maldekstra cirklo.

	Rpk.
<b>ABC-libro</b> por junaj infanoj, kun bildoj .. .. .	3
<b>La Botistoj.</b> Finna dramo. Kivi (Hall) .. .. .	4
<b>Diabet' en la botel'.</b> R. L. Stevenson (J. Seka) .. .. .	6
<b>Elektitaj Rakontoj</b> (bulgaraj). Elin Pelin .. .. .	6
<b>Esperanto por Infanoj.</b> G. G. Solomon. ilustrita .. .. .	6
<b>Eta kato kiu ne volis morti,</b> La. Infana rakonto .. .. .	2
<b>Filatela Terminaro.</b> H. M. Scott .. .. .	3
<b>Gaja Leganto per Esperanto.</b> P. E. Schwerin .. .. .	4
<b>Kiu estas kiu inter Nordamerikaj Esperantistoj</b> .. .. .	7
<b>Komuna kantlibro.</b> Holmes. (kun muziknotoj) .. .. .	6
<b>Kudra kaj trika terminaro.</b> M. & V. Verda .. .. .	3
<b>Londonanidoj.</b> D. W. Munns .. .. .	8
<b>Muzika Terminaro.</b> Butler kaj Merrick .. .. .	3
<b>Noni kaj Mani.</b> J. Svensson (v.d. Hövel) .. .. .	8
<b>Pola folkloro kaj popolkanto.</b> S. Grenkamp .. .. .	5
<b>Polusaj glacioj sub noktomeza suno.</b> J. Thézard .. .. .	4
<b>Por Recenzo!</b> K. R. C. Sturmer. bind. .. .. .	4
<b>Preĝlibro por spiritistoj.</b> A. Kardec. broŝ. 2 bind. .. .. .	3
<b>Premiaj romanetoj.</b> 23 bonaj rakontoj. .. .. .	8
<b>Synnøve Solbakken.</b> B. Bjørnson (Weide) .. .. .	6
<b>Tejo kaj Ĉerik.</b> H. G. Toms. Unua legolibreto. .. .. .	5

Mendu ĉe

Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

# LA "EPOKO" LIBROJ

*Respondkupono en Britujo valoras nun 4p. anstataŭ 3p.  
(La prezoj en respondkuponoj valoras nur ĉe UEA)*

1. **Murdo en la Orienta Ekspreso.** Agatha Christie.  
El la angla tradukis "Etulo".  
183 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 5 respondkuponoj afrankite.
2. **La Knaboj de Paŭlo-Strato.** Francisko Molnár.  
El la hungara tradukis L. Spierer.  
108 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 5 respondkuponoj afrankite.
3. **La Princo kaj Betty.** P. G. Wodehouse.  
El la angla tradukis G. Badash.  
185 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 5 respondkuponoj afrankite.
4. **La Tempo-Maŝino kaj La Lando de la Blinduloj.** H. G. Wells.  
El la angla tradukis E. W. Amos.  
180 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 5 respondkuponoj afrankite.
5. **Princino de Marso.** Edgar Rice Burroughs.  
El la angla tradukis K. R. C. Sturmer.  
181 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 5 respondkuponoj afrankite.
6. **Colomba.** Prosper Mérimée.  
El la franca tradukis Prof. J. Beau.  
184 paĝoj. 1ŝ. 8p. aŭ 5 respondkuponoj afrankite.
7. **Sep Vangofrapoj.** Karlo Aszlányi.  
El la hungara tradukis L. Spierer.  
148 paĝoj. 3ŝ. 3p. aŭ 10 respondkuponoj afrankite.
8. **La Virineto en Bluo** kaj aliaj rakontoj.  
Originale verkitaĵ de Mason Stuttard.  
150 paĝoj. 3ŝ. 3p. aŭ 10 respondkuponoj afrankite.
9. **Brulanta Sekreto** kaj aliaj rakontoj. Stefan Zweig.  
El la germana tradukis K. R. kaj P. Schwerin.  
160 paĝoj. 4ŝ. aŭ 12 respondkuponoj afrankite.

Eldonitaj de  
**THE ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD., ANGLUJO**

Mendu ĉe  
**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**  
*aŭ ĉe*

- en Belgujo : Belga Esperanto-Instituto aŭ Flandra Esperanto-Instituto.  
Brazilo : Brazila Esp.-Ligo aŭ I. Gomes Braga.  
Britujo : British Esperanto Association.  
Danlando : Libroservo de Centra Dana Esperanto-Ligo.  
Finnlando : Eldono Vilho Setälä.  
Francujo : Esperantista Centra Librejo aŭ S.A.T.  
Germanujo : Siegfried Ziegler Verlag.  
Italujo : La Ĉefdelegito de UEA.  
Maroko : La Peranto de UEA.  
Nederlando : Libroservo de LEEN ; libroservo F.L.E., Heroldo de Esperanto ; aŭ Internacia Esperanto-Instituto.  
Norvegujo : Esperantoforlaget A.S.  
Svedujo : Eldona Societo Esperanto.  
Svislando : La Ĉefdelegito de UEA.  
Usono : E.A.N.A.